# *Nicolás Maduro: provoka agado de usona ?ipo estis modele rifuzita.*




Karakaso, 15 maj (RHK) La prezidento de Venezuelo, Nicolás Maduro, taksis kiel provoka la ?usan eniron de usona ?ipo en la teritoriajn marakvojn venezuelajn.

Asertis Maduro ke "temis pri provoko, por elpruvi la reagon de la armeo, por konstati ?u estis timo a? hezitemo, sed la reago de la venezuela armeo estis modela".

La venezuela ?tatestro la?dis la preparon moralan kaj psikologian de la armeanoj fronte al la eniro de la usona ?ipo en la teritorian maron de tiu kariba lando kaj asertis ke temas pri "venko de la internacia juro, la paco kaj la moralo de la venezuela armeo".

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/190708-nicolas-maduro-provoka-agado-de-usona-sipo-estis-modele-rifuzita

**Radio Habana Cuba**